A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

## N-ro 2/2016 (259)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




foto Libuše Dvořáková

Universala Kongreso de Esperanto okazos en Nitra 23–30 julio 2016
En aprilo renkontiĝis en Nitra la kongresaj helpontoj

Tisk a distribuci tohoto časopisu finančně podpořil Kraj Vysočina

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto: Vladimír Dvořák,** Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumbazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

**Revizia komisiono de ĈEA:**

*Prezidanto*: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk

# LA 16-A ĈEA-KONGRESO EN PELHŘIMOV (13.-16.10.2016)

Estimataj gesamideanoj,

permesu al mi inviti vin al la plej grava ĉiujara aranĝo de ĈEA, kio post unu jaro estos denove kongreso. Tion entrudis al ni la nova civitana leĝaro laŭ kiu ni pasintjare devis ŝanĝi kaj aktualigi nian statuton kaj registri ĝin, kion ni jam sukcese trapasis. Ĉi-jare nun finiĝas oficperiodo de la estraro elektita antaŭ 5 jaroj en Šumperk kaj devas okazi novaj balotoj, kio sendube estas grava evento, ĉar ĉiuj membroj-alvenintoj decidos kien kaj sub kies gvidado direktiĝi plu.

Kiel ni ripete anoncis, mi kaj mia edzino Pavla volas forlasi niajn funkciojn (ne la movadon!) kaj iom liberiĝi de multegaj ofictaskoj kvankam pri konsiloj ni estos je dispono. Aliaj estrarmembroj pretas daŭrigi kaj tiel certigi kontinuecon. La ĉefan direkton kaj taskojn tamen difinos nova prezidanto, pri kies serĉado kaj eventuala strategio informas P.Chrdle kiel elektokomisiona estro en alia artikolo.



*studenthejmo*



*gimnazio*

Ĉi-jara kongreso okazos en Pelhřimov situanta meze de la respubliko. Loĝado, manĝoj kaj kelkaj programoj estas certigitaj en **Studenthejmo de la Industria mezlernejo kaj Faka mezmetiejo** (str. Friedova 1464) proksime al la busa stacidomo (foton vidu en Starto 2016/1). La ĉefa programo okazos en aŭlo de la gimnazio situanta nur 300 m per sendekliva

vojo de nia loĝloko. Danke al la loka klubo kaj persone d-ro M. Kašparů ni sukcesis trakti tre avantaĝajn kondiĉojn kaj inviti pluajn program-kontribuantojn. Por havi tempon ankaŭ por distraj kaj instruaj aferoj la kongreso ekstartos jam ĵaŭde. Tamen la kotizo en membra kategorio en 1-a etapo ĝis 15.9. restas nuraj 150 CZK kiel en pasintaj jaroj. Kontrakte garantiata kapacito ekde ĵaŭdo estas tamen nur 8 „ĉeloj“ konsistantaj el 2- kaj 3-litaj ĉambroj (kun duŝejo/necesejo komuna por 2 ĉambroj), ĉar alia parto de la konstruaĵo ĝis vendredo servos al gelernantoj.



*manĝejo*



*klubejo por seminarioj*

Por instigi vin al frua aliĝo per iu sugesto, ni garantias, ke ĉiuj plentempaj aliĝintoj ĝuos loĝadon maks. duope, se ili mem ne deziros loĝi triope. Krome riĉa subvenciado permesis al ni oferti duontagan busekskurson al la urbo Pacov kaj la klostro Želiv (inkluzive ties bier-farejon), planatan  por vendreda antaŭtagmezo, tute senpage, inkuzive enirbiletojn!

**Avantaĝa kompleta pakaĵo** kovranta 3 tranoktojn kaj kompletan manĝadon kun senpaga busekskurso kostas 1.270 CZK kaj enhavas absolute neniun krompagon kompare kun niaj kontraktoj.

La estraro tial esperas fluan kontinuan aliĝadon sen lastatempaj premoj kaj substrekas, ke nun garantiata kapacito por senpaga busekskurso pro loĝlimigo de ĵaŭdo koncernas nur unuajn 32 aliĝintojn inkl. tutan estraron. La kondiĉoj ankaŭ devigis nin oferti maks. 4 1-litajn ĉambrojn kaj nur por plentempaj restantoj. La kapacito ekde vendredo estos jam sufiĉa por ĉiuj interesiĝantoj. Tamen ni esperas disponi pri pluaj ĉambroj jam ekde ĵaŭdo, sed oni informos nin nur fine de septembro, ĉu tio realas.

Prefere do ne tro hezitu ĝis 15.9. kaj ne maltrafu renkontiĝi kun aliaj membroj! Krom ŝanco influi venontan ĈEA-strategion vi povos ĝui ami

kan interparoladon dum sabatvespera dancprogramo kun tombolo. Ni planas liveri tempon ankaŭ por posttagmezaj klerigaj seminarioj (lingva kaj komputila), komenciĝantaj ĵaŭde kaj vendrede ekde la 16-a horo, kaj diskutoj pri aktualaj movadaj temoj. En www.esperanto.cz ni startos en julio elektronikan enketon pri viaj temaj preferoj, laŭ kiuj ni klopodos laŭeble adapti konkretan oferton. Kiel kutime ĵaŭda vespero estos pli dediĉita al klerigado, kaj la vendreda al kulturo. Ni ne forgesos ankaŭ pri ŝatata kantado kun gitaro. Sabate posttagmeze vi povas ĝojatendi promenon tra la historia urbokerno de Pelhřimov kun ĉiĉerona klarigo. Sekva vizito de la Muzeo rekordoj kaj kuriozaĵoj estos nedeviga kaj neinkluzivita en la kotizo, tamen vi povos ĝui grupan rabaton (kaze de pli ol 20 personoj).

Mi jam parolis pri abunda donacado aŭ sponsorado kaj nun permesu al mi publike prezenti, ke la Regiono Vysočina (Kraj Vysočina) subtenis nian aktivadon per entute 20.000 CZK same kiel la firmao Ciret s.r.o., kiu por la sama celo dediĉis 5.000 CZK. Rekte por la kongreso kaj difinitaj celoj kontribuis la urboj Pelhřimov (per 10.000 CZK) kaj Pacov (per 3.000 CZK). Iliajn blazonojn vi povas spekti ĉi-sube. En la nomo de la tuta organizo mi sincere dankas al ili ĉiuj!

Ciret

PODPOŘIL Kraj Vysočina

*Regiono Vysočina* *Pelhřimov* *Pacov*

Pliaj detaloj inkl. elektronikan aliĝilon, fotogalerion kaj programon de la plenkunsido estos publikigitaj somere en Kalendaro de aranĝoj en www.esperanto.cz. En Starto 2016/3, aperonta fine de septembro, vi trovos la plej freŝajn aktualaĵojn kaj rekomendojn pri transporto. Nome de la komitato mi elkore invitas kaj ĝojatendas vin!

**Vladimír Dvořák, ĈEA-prezidanto**

**La aŭspician patronatecon transprenis la hetmano MUDr. Jiří Běhounek kaj la urbestro ing. František Kučera.**

# Raporto de la ĈEA-elektokomisiono

Antaŭ ol mi komencis verki ĉi tiun raporton mi pripensis, ĉu mi skribu ĝin en la ĉeĥa aŭ en Esperanto. Por ambaŭ ekzistas bonaj kialoj: Laŭstatuta devo de membroj estas lerni Esperanton kaj ĉar per ĉi tiu artikolo mi volas alparoli precipe novajn kandidatojn, do ili certe komprenu la tekston en Esperanto. Sed balotojn partoprenos ankaŭ komencantoj, tial la fragmentojn el la elektoregularo mi citos en la ĉeĥa.

La elektokomisiono, elektita dum la pasinta ĈEA-kongreso, konsistas el la ĈEA-eksprezidantoj Věra Podhradská, Jana Melichárková kaj Petr Chrdle. Ĝi agis kongrue kun la valida elektoregularo, el kiu mi citas:

Nejdůležitější úlohou komise je získat vhodného kandidáta (kandidáty) na funkci Předsedy a průběžně s ním (nimi) pracovat: tj. od seznámení s prací Výboru a jeho úkoly až po předkládání jmen a funkcí ostatních oslovených kandidátů pro Výbor. Cílem je, aby každý potenciální kandidát na Předsedu mohl nejpozději 40 dní před konáním sjezdu předložit komisi závaznou kandidátní listinu, zahrnující stručné představení svého programu a priorit a jmen 4-6 předjednaných kandidátů do Výboru, vč. funkcí, které mají zastávat. Komise se řídí zásadou, že každý kandidát na Předsedu může předložit jen jednu kandidátku. Zároveň je však možné (a často i vítané), aby kandidáti do všech dalších funkcí Výboru se objevili na více kandidátkách.

La komisiono sukcesis trovi konvenan kandidaton por la prezidanto, nome la iaman komitataninon Libuše Hýblová, kaj helpi al ŝi kolekti la kandidataron por la tuta komitato. Sed mi volas emfazi, ke iu ajn rajtas konsistigi propran skipon de kandidatoj kaj aliĝi ĉe ni kiel kontraŭkandidato por la posteno de prezidanto (do lia skipo aliĝi kiel kandidato por la komitato). Tiu eventuala dua (aŭ plia) kandidato por la prezidanteco aliĝu al ajna membro de la elektokomisiono. Mi citu el la regularo, kiel oni procedu, se oni havas pli da kandidatoj:

Komise nemá právo některou z kandidátek zamítnout a nepředložit sjezdu. Má však právo před samotnou volbou shrnout sjezdu své poznatky při tvorbě kandidátek a nejvýše 2 doporučit. Zároveň má komise povinnost dle svých možností jednotlivé kandidátní listiny distribuovat mezi členy a zajistit, aby při prezentaci pro sjezd byly vyvěšeny a v několika dalších exemplářích k dispozici i pro zapůjčení na místě konání.

Ještě dodávám: Volební řád bude po dobu sjezdu vyvěšen na viditelném místě a také k zapůjčení u všech členů volební komise, jak nám ukládá volební řád, ale abyste se mohli s dokumenty seznámit předem, uvádím odkaz na stránku, kde jsou všechny důležité dokumenty k dispozici:
**http://www.esperanto.cz/cs/kontakty-a-organizace/cesky-esperantsky-svaz-z-s/co-je-ces**

Ni esperas, ke dum la kongreso ni renkontiĝos kun plejparto de la membroj de ĈEA kaj komune elektos bonan skipon de komitatanoj, kiuj efike gvidos nian asocion dum minimume tri sekvantaj jaroj.

*Por la elektokomisiono:*
*Petr Chrdle, chrdle@kava-pech.cz*

# NOVAĴOJ PRI LA SEKCIO DE NEVIDANTOJ DE ĈEA

Jarkunveno de la sekcio okazis la 9-an de aprilo 2016 en Prago en saloneto de la restoracio *"Sedm konšelů"*. Nome de la ĈEA-komitato partoprenis ĝin denove Pavla Dvořáková por resumi la ĝisnunan kaj pritrakti pluan kunlaboron. *Starto* estas plu distribuata ankaŭ en speciala formo uzebla per voĉsinteza programaro por nevidantoj. Geedzoj Jelínek kaj Karaš registris en majo 2015 kadre de unu semajnfino entute 18 kantojn en Esperanto, kiuj estas nun preparataj por eldono sur kompaktdisko - ĝi devus esperebIe aperi antaŭ la UKo en Nitra.

Geedzoj Jelínek lastjare kontribuis per muziko kaj prelego pri specifaĵoj de vojaĝado far nevidanoj dum la septembra inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy. La prezento vekis grandan intereson kaj pozitivan reeĥon. Pri simila temo rakontis kaj fotoprojekciis ankaŭ prezidanto de la sekcio Jan Příborský dum la 15-a ĈEA-Kongreso en Ústí nad Orlicí kaj geedzoj Jelínek pretigis samtage belan koncerton.

Pavla Dvořáková preparis videoresumon el la koncerto, kiu publike disponeblas en la Muzea paĝaro ĉe Ipernity. Geedzoj Karaš, kiuj loĝas en Kamenice nad Lipou proksime al Pelhřimov, estis alparolitaj por kulture kontribui al la programo de la ĉi-jara ĈEA-Kongreso.



La geedzoj Jelínek kaj Karaš kun la prezidanto J. Příborský (*foto P. Dvořáková*)

Ĉe la Muzea paĝaro ĉe Ipernity estis publikigitaj ankaŭ kelkaj sonregistraĵoj, kiujn realigis antaŭe geedzoj Karaš por la gazeto *"Aŭroro",* kiun la sekcio eldonas. Temas pri la legendo pri Bruncvík kaj kelkaj ĉapitroj el Švejk. Plua sonartikolo pri Jaroslav Ježek, kiu onidire, ankaŭ pasigis Esperanto-kurson sub gvido de Vuk Echtner, aperos en septembro omaĝe al lia naskiĝtagdatreveno. Okazis ankaŭ informinterŝanĝo kaj diskuto pri pluaj kunlaboreblecoj. Krome la sekcio aktive kontribuos al la programo de kongreso de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Espe-rantistoj), kiu okazos en Nitra tuj post fino de la UKo.

*Pavla Dvořáková*

Jan Neruda

Romance o Karlu IV.

Král Karel s Buškem z Velhartic
teď zasedli si k dubovému stolu -
ti dva už pili mnohou číši spolu
a zapěli si z plných plic.
"Nuž dej sem zlaté číše, páže,
a nalej vína – dolej výš -
dnes, pane Bušku, čehos zvíš!"
král Karel vesel káže.

"Zde po tom víně, Bušku, slyš,
domácí slunce naše vloni hrálo -
toť první víno, které v Čechách zrálo -
aj tedy vzhůru, pijme již!"
A pili – král však náhle prsknul –
"To že je víno? tenhle kvas?
Vždyť křiví ústa, láme vaz!"
a zlostně rukou mrsknul.

"Eh – vezu révu z Burgund sem,"
král dál a dál si v zlosti svojí vede,
"a takovouhle peluň mně z ní svede
ta velebená česká zem!
Jsem přesvědčen, když broskve vsadím,
že sčesám trpké trnky z nich,
a chceš-li klidit pustý smích,
zde růže sázet radím!

Však jaká země – taký lid!
Vás kdyby učit chtěli všichni svatí,
zda všimnou si jich Češi paličatí -
buď svatý rád, když není bit!
Jak bych zde mlátil otep slámy!
Nechť chci co chci, za krátký čas
se všechno jinak zvrtne zas -
mám já to bídu s vámi!"

Přec zase číši k ústům zdvih
a napiv se své velké dobré oči
teď kradmo přes stůl po soudruhu točí,
ten však je jako pěna tich.

Jan Neruda (1834-1891)

Romanco pri Karolo la Kvara

Ĉe kverka tablo reĝ‘ Karol‘
kun Bušek z Velhartic nun lokojn prenis;
jam ofte ili kone trinkfestenis
kantante laŭ plezura vol‘.
“Pokalojn orajn! — Verŝu plene!‘
la reĝ‘ ordonas al paĝi ‘
Nun, Bušek, ion spertos Vi!“
li diras ĝojmiene.

“Jen, Bušek, la unua vin‘,
kiun ĉe ni kulturi mi sukcesis;
ĝin antaŭ jar‘  ĉi-landa sun' karesis!“
Subite, gustuminte ĝin,
kraĉetas li. “Ho ve ĝi estas
ne vin‘, sed buŝkurbiga feĉ‘!
Ĝi nukon mian rompos eĉ!" —
kaj li kolere gestas.

“Eh! - el burgunda vinober‘,“
la reĝo ekscitite plu murmuras,
“ĉi tian vermutaĵon elkulturas
la adorata ĉeĥa ter‘!
Pri persikarbo mi ne miros,
prunelojn se produktos ĝi;
plantante rozojn tie ĉi,
nur mokon mi akiros...

Kaj kia lando, tia gent‘!
Jes, ĉiu ĉeĥo estas obstinulo:
li pagus eĉ predikon de sanktulo
per bato – aŭ per malatent‘.
Jen kvazaŭ draŝ‘ de pajla fasko;
nur tion sperti, ke sen ĉes‘
min persekutas malsukces‘ –
kiel ĉagrena tasko!“

La reĝo tamen post moment‘
retrinkis. Lia milda okulparo
kaŝeme turnas sin al la najbaro –
sed tiu restas en silent‘ ;

Jen – aby marně nezahálel -
pan Bušek máčel zub a pysk
a víno ku půnebí tisk
a po jazyku válel.

"Ba je to bída," děl zas král
a rychle zavdal sobě vína znovu,
tak rychle, jak by bránil zlému slovu;
však kolem úst již úsměv hrál.
"Mám žízní umřít? – Na mou víru,
Tys oslep, páže, nevidíš?
že přede mnou je prázdná číš? -
A dej mi dobrou míru!

Pij, Bušku – již se nazarmuť -
a poslyš, co Ti král Tvůj moudrý praví:
můj jazyk je jak známo vybíravý -
a našel již v tom víně chuť.
Víš – zkoumat třeba, Bušku milý,
to víno má svůj zvláštní ráz,
zprv trpké, ale milé zas -
my, myslím, se už vpili!"

"Nu vidíš, králi: tak náš lid!
Má duši zvláštní – trochu drsná zdá se
– však kvete po svém, v osobité kráse –"
teď přerušil svůj náhle klid
hned rozveselen Velhartice –
"ach přibliž k tomu lidu hled
a přitiskneš svůj k němu ret
a neodtrhneš více!"

nur – por ne teni sin senmove –
li trempas lipojn en la vin‘,
al la palato premas ĝin,
sur lang‘ ĝin rulas prove.

La reĝ‘ ripetas: „Jen ĉagren‘...“ –
sed li rapide novan gluton faras
kaj sian pluan plendon tiel baras;
sed sereniĝas la mien‘.
„Pokal‘ malplenas! Ha, terure!
Ĉu pro soifo mortu mi?
Ne estu blinda do, paĝi‘,
kaj verŝu bonmezure!

Nu, Bušek, ne malĝoju plu!
Jen kion diras via reĝ‘ prudenta:
nun mia lango, certe subtilsenta,
ĉi vinon taksas jam kun ĝu‘.
La juĝo devas esti justa!
Ĝi estas vin‘ de stranga spec‘:
maldolĉon sekvas agrablec‘ –
ni trovas ĝin bongusta.“

„Simile, reĝo, nia gent‘:
malmilda ŝajnas ĝi kaj iom stranga,
sed ĝin ornamas ĉarmo siaranga,“
sin liberigis de l‘ silent‘
sinjoro Bušek tre volonte.
„Ĉi genton fidu; baldaŭ ĝin
alpremos vi al via sin‘
ne plu ĝin forpuŝante!“

*el la ĉeĥa originalo*
*tradukis Miloš Lukáš*



*Karolo la Kvara*
*fondas vinberejon*

*Bildo de Josef*
*Mathauser*
*(1846-1917)*

*Sonregistraĵo kun deklamo*
*de Miroslav Smyčka aŭskulteblas ĉe*
*http://www.ipernity.com/doc/181031/15184987*

*spegulforme ciferecigis -padv-*

# Muzea nokto 2016

Muzeajn noktojn en Ottendorfer-domo reĝisoras jam 7 jarojn Radka Oblouková, estrino de la teatro DOMA. Oni ĉiam revenas en la tempo, ĉi-jare en la jaron 1896.



Programestro en la salono de la Ottendorfer-domo estis Matěj Nárožný. Dum la solena vespero la urbestro F. Sander prezentis sian salutparolon kaj infanoj el la loka orfejo preparis ĉarman dramigon de "Lampiroj" de Jan Karafiát. La Svitavanoj povis ankaŭ aprezi la "kantoarton" de glora viena trio "fratinoj Moleno". Prezentiĝis ankaŭ migrantaj muzikistoj. Dagmar Martínková rolis prezidantinon de Societo por Virinaj Interesoj M. E. Tschauner, Marie Minářová kaj Ján Bobrík pluaj personulojn de la urbo.

En la ejo de Esperanto-Muzeo estis funkciigita originala Edisona kinematografo kaj danke al Frau Kunnert (Libuše Dvořáková), direktorino de la "Unua Societo Kinematografa", kaj aliaj societoj de Svitavy, la vizitantoj povis spekti rarajn fabelajn rakontojn. Por vizitantojetuloj estis preparitaj lekbombonoj sur stangeto. En la subteraj spacoj de la biblioteko de Svitavy la infanojn atendis ne nur la fama fantometo Kuli, sed ankaŭ aliaj hororaj estaĵoj.

La vespero havis magian etoson - sian ĝuon kaj amuzon ricevis ĉiuj generacioj de Svitavanoj (proksimume 250 infanoj, studentoj kaj plenkreskuloj).

*Libuše Dvořáková*

# La 19-a Esperanto-Tago en Pardubice




foto P. Nechvíle

La membroj de la Klubo de esperantistoj de dr. Schulhof kaj de la Asocio de AEH en Pardubice organizis sabate la 4-an de junio 2016 sian tradician renkontiĝon sub la nomo La 19-a de ESPERANTO-TAGO. En la nova kafejo ĉe la korto de la kastelo en Pardubice renkontiĝis 45 esperantistoj inkluzive de kelkaj familianoj kaj lokaj neesperantistoj.

El la programo mi elektas: Ĉe la okazo de la 700-a naskiĝdatreveno de la ĉeĥa reĝo kaj imperiestro de la sankta roma regno Karolo la Kvara prezentis al ni artistino s-ino Stanislava Hošková el la "Teatro de unu artisto" rememoron el lia vivo.

*(daŭrigo sur p. 62)*

# Eksaj tendaranoj en la golfo de Lančov

Jam la 19-a renkontiĝo de ekstendaranoj de Lančov okazos en la tagoj

**12.8. – 14.8.2016**

**Vendredo**: alveturo, vespermanĝo, tendarfajro
**Sabato**: matenmanĝo, mallonga viciĝo, komuna fotado, libera programo, tagmanĝo, libera programo, vespermanĝo, tendarfajro
**Dimanĉo**: matenmanĝo, adiaŭo, forveturo
La programo adaptebla laŭ la vetero kaj laŭ deziro. Eblas viziti ekzemple novan Fajrobrigadistan Bierfarejon aŭ Muzeon de Veteranoj (aŭtoj), ambaŭ en Bítov.

**Prezoj:**
**Partoprenkotizo**: 50 Kč
(por aliĝintoj antaŭ 1.8.2016)
**Tranoktado**: 90 Kč (unu nokto)
**Litaĵoj:** 70 Kč (eblas propraj)
**Matenmanĝo**: 25 Kč (unu mateno)
**Tagmanĝo** 75 Kč
**Vespermanĝo** 9.8. 55 Kč
**Vespermanĝo** 10.8. 75 Kč

**Kiu aliĝos post 1.8.2016, devos pagi partoprenkotizon 80 Kč, ĉar necesos aĉeti novajn provizojn.**

**Vi povas antaŭpagi al bankokonto:** Fio bank a.s, 2300386901/2010 VS 1952, enskribu vian nomon en mesaĝo por la akceptonto
**Email**: let.lancov@seznam.cz
olgalacinova@seznam.cz
**Mobil**: +420 737 348 878 (Olga Lacinová)
+420 604 940 663 (tendara poŝtelefono)

# SAT kongreso 2016 en Herzberg am Harz

okazos en tagoj 16.7.2016 – 23.7.2016, la loka OKK invitas vin partopreni. Rim. Post la SAT kongreso tuj sekvas UK en Nitra.
La partoprenkotizo por nemebroj de SAT: ĝis la 30-a de junio 65,-€; poste 70,-€
*Partoprenintoj el Ĉeĥio kaj Slovakio ĝuas 30% rabaton.*

**Programo, vizitoj, ekskursoj.**

Aliĝilon kun informoj vi trovas ĉe:
http://sat89.esperanto-urbo.de/aligxo/
Pluajn informojn ankaŭ ĉe Václav Stibůrek, SAT-peranto por Ĉeĥio stiburek.v@seznam.cz

# 4-a DEKLAMKONKURSO

**la 23-an de oktobro 2016 en Bjelovar**

La Deklamkonkurso estos parto de la programo „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo“, okazonta honore al Tago de la urbo. Partopreni povas junaj esperantistoj, lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj el Kroatio kaj eksterlando kaj plenaĝaj esperantistoj.
Aliĝojn bonvolu sendi al:
***1. Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, ĉe Marija Jerković Jarunska 6, 1000 Zagreb; mjerkovic@net.hr***
***2. Bjelovara esperantista societo, 43 000 Bjelovar, Vlatka Mačeka 14, esperanto.bjelovar@gmail.com***

# Klubaj informoj

**Brno:** La 20-an de aprilo 2016 vizitis la klubon redaktoro de la ĵurnalo Deník Rovnost Martin Vérteši, studento de ĵurnalitistiko, kaj la 25-an de aprilo aperis tutpaĝa artikolo pri Esperanto sub titolo ***Komuna pasio. Artefarita lingvo ilin kunigis. Ili verkas librojn en ĝi***.




*La redaktoro klarigas sian koncepton, dekstre la rezulto legebla ĉe la asocia domajno, rubriko Aktuality.*

La klubo havas novan retejon, ĉe kiu oni povas legi ankaŭ klubajn prelegojn:
http://esperantobrno.cz/malnova/elsutu.html
ekz. pri Ekslibrisoj de la runama gastino Gabriela Stier (*dekstre de la komputilo*)



**Kun fotilo inter libeloj** estas titolo de nova libro aĉetebla kontraŭ 150 Kč, kiun verkis kaj eldonis klubano de Brno Oldřich Arnošt Fischer uzante proprajn fotojn pri libeloj (ĉeĥe: *vážky*).




**Svitavy:** La 22-an de majo 2015 esperantistoj partoprenis nostalgian veturon de vaportrajno inter Svitavy-Polička omaĝe al 120 jaroj de tiu trako kaj 760 jaroj de la urbo Svitavy. Post promeno tra Polička la esperantistoj revenis al Esperanto-muzeo en Svitavy, aŭskultis prelegon de Miroslav Hruška pri paska vizito de Ukrainio kaj vespere ili rostis kolbasetojn en ĝardeno. Dimanĉe en la muzeo kunvenis la asocia komitato, kiu traktis ĉefe pri preparo de la asocia kongreso aŭtune en Pelhřimov.



**Vítkovice:** la 25-an de majo 2016 la klubanoj de Vítkovice amuziĝis ĉe ovofritaĵo.



www.esperantovitkovice.estranky.cz/fotoalbum/nia-klubo/

# EK Písek



La 29-an de aprilo 2016 okazis en saloneto de la restoracio "V koutě" jarkunveno de la klubo "La Ponto", kiu kunigas membrojn el diversaj komunumoj de Suda Bohemio. Krom jarraporto kun fotoprojekciado kaj planado de la aranĝoj por 2016 oni samtempe festis vivjubileon de la prezidantino Pavla Dvořáková kaj kantis kun gitaro. Post la kunveno kelkaj membroj partoprenis ankaŭ folkloran muzikan programon kadre de *"Starigado de majtrunko"* ĉe la Ŝtonponto.

# Přerov

La 16-an de aprilo 2016 en saloneto de restoracio Pivovar Zubr okazis membrokunveno, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el Hranice kaj Prostějov




*(laŭ informilo de EK Prostějov)*

# Olomouc

La 20-an de majo 2016 okazis jarkunveno de EK Olomouc, kiun partoprenis ankaŭ membroj de Prostějov.



*(laŭ informilo de EK Prostějov)*

# Skokovy 2016

Du fotoj de s-ino Pazourková





# Impresoj el la Germana Esperanto-Kongreso

Tradicie dum la pentekosta semajnfino okazis la Germana Esperanto-Kongreso, ĉi-jare de  la 13a ĝis la 16a de majo en Munkeno. Ĝin ĉeestis entute proksimume 210 partoprenantoj, plejparto memkompreneble germanaj, sed krome 55 gastoj el 20 landoj (el Ĉeĥio krom mi Karel Votoček kaj Jindřich Košťálek), do la etoso estis agrable internacia.

La unua vespero estis dediĉita al festeno okaze de la 125-jariĝo de Esperanto-Klubo Munkeno.  Dum ĝi la partoprenantoj krom surpodia muziko, kantado kaj sorĉado spektis ankaŭ mallongan historian retrorigardon kaj eĉ estis regalitaj per tipa bavara vespermanĝeto konsistanta el blankaj kolbasoj kun brecoj.

Krom la solena inaŭguro, festprelego de Reinhard Foessmeier kun la temo *Esperanto – ĉu seriozaĵo?*, fermo de la kongreso kaj de la vesperaj kulturaj programoj, okazis plejparte po 5 paralelaj programeroj. Pro tiu riĉa elekteblo mi timis, ke miaj du kontribuoj ne altiros interesiĝantojn, sed ambaŭkaze estis la ĉambroj agrable plenigitaj per interesoplenaj aŭskultantoj.

Unue mi prezentis al la ĉeestantoj la reformacion sur la teritorio de Ĉeĥio, ekde Jan Milíč el Kroměříž, trans Jan Hus, Jeroným Pražský, Petr Chelčický, Frato Řehoř kaj Komenio ĝis la nunaj eklezioj en Ĉeĥio, kiuj sin konsideras heredantoj de la ĉeĥa reformacio. Bedaŭrinde mi forkonsumis la tutan tempon mem parolante, do la diskuto kun kelkaj ĉeestintoj okazis nur pli poste en la libroservo.

Mia dua kontribuo al la kongreso estis lanĉa prezento de du novaĵoj de mia eldonejo KAVA-PECH, ambaŭ tradukoj el la germanaj originaloj.

La libron de Martin Stuppnig *Home en senhomeco - Militimpresoj* mi jam prezentis al la legantoj de Starto en la pasinta numero. Mi nun nur publike reagas al la miro de kelkaj, kial Martin, perfekta esperantisto, ne mem tradukis la libron kaj kial la traduko estis farita de alia esperantisto, Jozefo Horvath: La kialo estas, ke Martin malsanas je la okuloj kaj eltenas rigardi al la ekrano nur tre limigitan tempon. Tamen, krom tiu malhelpo li estas feliĉe en tre bona sanstato, eĉ mirinda, se oni konsideras la fakton, ke li jam transpaŝis sian naŭdekan vivojaron. Li ankaŭ ĉeestis la lanĉon, perfekte parolis kun sia ĉiama ĉarmo kaj senlace subskribadis la librojn por la interesiĝantoj.




*Martin Stupping maldekstre*

La dua prezentita libro estis *Heredantoj de silentado* de la germana verkistino Sabine Dittrich, kiu, kvankam neesperantistino, alparolis la ĉeestantojn en Esperanto, kio kaŭzis grandan aplaŭdon. Temas pri romano kun la fono de komplikaj ĉeĥaj-germanaj rilatoj, precipe post la dua mondmilito.



*La eldonisto Petro Chrdle kun la aŭtoroj de la prezentataj libroj Sabine Dittrich kaj Martin Stuppnig*

Junan judan germaninon, kiu volas ekscii ion pri siaj antaŭuloj, gvidas ŝia esploro al Prago. Tie ŝi ne nur renkontas amon al  simpatia ĉeĥa instruisto, sed pere de ties gepatroj, kaj ankaŭ en sia germana ĉirkaŭaĵo, ŝi ekkonas la malnovajn historiajn vundojn kaj la restantajn gutojn de malamo. Finen de la libro la aŭtorino aldonis koncizan historian trarigardon de la rilatoj inter germanoj kaj ĉeĥoj sur la teritorio de Ĉeĥio. Ĝi estas kompletigita per mapo de Ĉeĥio kun la indiko de la regionoj kun plejparte germanlingvaj loĝantoj.




*Mikaelo Bronŝtein kun Elena Nadikova komune salutas nome de Rusio kaj Ukrainio, apud ili estas la GEA-prezidanto Sebastian Kirf*

Kiel la aŭtorino klarigis, la intrigo respegulas kelkajn romanstile kompilitajn verajn okazaĵojn. Ĉar la libro ankoraŭ ne estis finpretigita antaŭ la kongreso, mi produktigis almenaŭ tri provekzemplerojn kaj cirkuligis ilin tra la publiko, por ke oni povu pli bone konatiĝi kun ĝi.

Memkompreneble, pro la riĉeco de la programo, al mi ne eblis viziti eĉ kvaronon el la interesaj programeroj. Mi volas tamen emfazi almenaŭ kelkajn. Tre pozitivan eĥon havis la rekta kurso por komencantoj, gvidata de Stano Marček, kiun ĉeestis dudeko da komencantoj. Senlaca Mikaelo Bronŝtein ne nur tradicie amuzis la publikon per sia gitare akompanata kantado, sed prezentis ankaŭ dum unu programero sian novan romanon *Mi stelojn jungis al revado*, dum alia rakontis pri sia laboro en karbominejo de Vorkuta kaj dum tria kiel denaska Ukrainano vivanta en Rusio analizis serioze la historion de la ukrainorusaj rilatoj.

Mi ne forgesu mencii la riĉajn vesperajn kulturajn programojn. Kajto muzikis tradicie altkvalite, min en la plej pozitiva senco de la vorto surprizis profesia muzikala kantisto, dancisto kaj aktoro el Vieno, Attila Schimmer, kun sia grupo el Vieno kaj Budapeŝto, kiun mi antaŭe neniam vidis kaj kiu tre impresis min.




*Nu, GEA ankaŭ kunsidis, kaj kvankam ĉi-jare ne estis elektojaro, ili traktis la tutan posttagmezon. Sur la foto vi povas vidi la podianojn; de maldekstre: Wolfgang Bohr, Christoph Hoppe, Julia Noe, Sebastian Kirf, Andreas Emmerich, Oliver Walz kaj Christof Krik.*

Kiel tradicia okazaĵo dum la Germanaj Esperanto-Kongresoj, okazis ankaŭ ekumena Diservo, kiun kuncelebris la katolika pastro Albrecht Kronenberger kun la nederlanda remonstranta pastoro Gerrit Berveling.

El kvin ofertataj ekskursoj por la dimanĉa posttagmezo mi elektis promenon tra la munkena centro, kiu estis tre agrabla, gvidata de simpatia ĉiĉeronino Emma Breuninger, eĉ la vetero post pluvaj tagoj estis optimuma, kun nur unu malagrabla trajto: Pro la freneza solenado de la subtenantoj de Bayern, la loka piedpilka klubo fariĝinta denove germana ĉampiono, la centra placo estis tiom homplenigita, ke ni ne povis eĉ alproksimiĝi. Kaj tion ankaŭ akompanis adekvata bruego.

*Teksto: Petro Chrdle*
*fotoj: Reinhard Foessmeier*

# Mia lernohelpado en MES-2016

Miaj konoj de Esperanto estas jam sufiĉaj por interkompreno kaj mi klopodas plibonigi ankaŭ miajn gramatikosciojn. Tute hazarde mi troviĝis kun nia entuziasme agordita Jindra Drahotová ĉe la bordo de Mediteraneo en Francujo: Do „nia“ klaso renkontiĝis matene je la 9a en ĉambrego Nardelli apud bele ekipita hotelo Vacanciel en loko nomita Les Issambres. Ni havis ĉion bezonatan, tabulon, skribilojn, nun ni atendas LERNANTOJN:

Vidu, lernantoj vere alvenas! Annick, Arlette, Ĵanine, Christophe, Monik, Vivian, Lilian, Maĉjo, Maks, Toni, Rozi, Reinard kaj dum lernado alvenis ankoraŭ Jean-Paul, poligloto. Kelkfoje vizitis nin aliaj membroj de apudaj klasoj. Bone, la kurso povas komenciĝi: prezentado, enketilo (por scii kion oni devas ripeti el gramatiko). Jindra uzis materialon el la sveda lernolibro Liza kaj Paŭlo. Ĉiumatene ni gimnastikis por amuzi niajn lernantojn, mi opinias, ke tiun parton de lernado ĉiuj regis vere brile.

Por gramatiko ne restis tiom da tempo kiel ĝi meritas, sed ĉefe ni ĉiuj klopodis paroli, ne timi rakonti ion al aliaj. Ni rememoris konatan francan kanton Fromaĝ' el Edamo aldonante esperantigitajn vortojn de Tim Morley. Ekstraordinare sukcesis teatrado: la skeĉoj de niaj lernantoj amuzis la tutan klason, eĉ la tutan grupon de partoprenantoj la lastan vesperon. Ŝercoj pri blondulinoj estas bonaj por ĉiuj jam kalvaj, nigroharaj aŭ ankaŭ por blondulinoj, kiuj scias ŝerci pri si mem!

Posttagmeze dum sufiĉe bona vetero ni vizitadis aliajn urbetojn, montaretojn kun mimozoj, bordon de la maro – por alporti bonan etoson ankaŭ en nian landon, kie post rehejmiĝo dense neĝis.

Danke al la tuta amika grupo de esperantistoj el dek landoj mi sentis min vere bone – kiel ĉiam kun esperantistoj. Bonvolu demandi niajn lernantojn ĉu ili atingis sian celon „senpolvigi“ Esperanton, nian amatan lingvon kaj finfine uzi ĝin. Mi mem spertis neforgeseblajn momentojn. *teksto / foto Jarka Malá*



# Přihláška na sjezd ČES (Pelhřimov 13.-16.10.2016)

Přihlášku vyplňte a zašlete emailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese www.esperanto.cz/aligxilo2016

**Doporučení:** Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

**jméno a příjmení účastníka** (příp. včetně titulů - tak bude na jmenovce účastníka sjezdu)

adresa:

ulice

PSČ a místo

e-mail telefon

**variabilní symbol platby** – číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření nárokovaného zvýhodnění), nečlenové napište 5 číslic, kde první nebude „0“

Následující dva údaje musíme uvést pro ubytování - vyplní tedy jen ten, kdo bude ubytovaný.

číslo občanského průkazu datum narození

**Označení u čtverečků křížkem (nastavíte/zrušíte mezerníkem) znamená výběr.**
**Zakroužkování (při ručním vyplňování) okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

**Přihlašuji se na akci Českého esperantského svazu v Pelhřimově, objednávám a zavazuji se uhradit následující.** (Přihláška je platná až po zaplacení.)

| | | |
|---|---|---|
| Základní účastnický poplatek | 350 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 15.9.2016** | 250 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 15.9.2016** | 150 Kč | ☐ |
| Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen výboru ČES, místní organizátor, správce Libroserva, člen volební komise, vedoucí seminářů a předem ohlášení kandidáti do výboru | 0 Kč | ☐ |
| Jako mládež do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci) | | ☐ |

Adresa ubytování : Střední průmyslová škola a Střední odborné učiliště – Domov mládeže Friedova 1464, v blízkosti autobusového nádraží. Pokoje 2+3 lůžka se spol. koupelnou a WC.

Objednávám **zvýhodněný kompletní balíček**:

| | | |
|---|---|---|
| 3 noclehy v 2-3-lůžkovém pokoji a stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda a zájezd v pátek dopoledne | 1270 Kč | ☐ |
| 3 noclehy v samostatném pokoji a stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda a zájezd v pátek dopoledne (lze max. pro 4 osoby) | 1720 Kč | ☐ |
| 3 noclehy a stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 550 Kč | ☐ |
| jen stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 550 Kč | ☐ |

Pro ubytované od čtvrtka je jako bonus páteční výlet busem zdarma.
Při noclehu od čtvrtka je záruka ubytování po dvojicích do kapacity 8 buněk (32 osob).

Objednávám **jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby**:
Pozn.: Rozhodně nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček výše.

| | | |
|---|---|---|
| nocleh z pátku a ze soboty (jen jeden samostatně nelze) | 520 Kč | ☐ |
| | | |
| večeře – čtvrtek | 75 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - pátek | 45 Kč | ☐ |
| oběd - pátek | 85 Kč | ☐ |
| večeře - pátek | 75 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - sobota | 45 Kč | ☐ |
| oběd - sobota | 85 Kč | ☐ |
| večeře - sobota | 75 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - neděle | 45 Kč | ☐ |
| oběd - neděle | 85 Kč | ☐ |

| | |
|---|---|
| Jsem vegetarián (volba jídla pro stravující se) | ☐ |

prosím ubytovat s: (vepište jméno osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Nebude-li spolubydlící uveden, rozdělíme přihlášené do pokojů dle pohlaví a věku!

| | | |
|---|---|---|
| členský příspěvek ČES na rok 2017 | | Kč |
| případný dobrovolný příspěvek pro ČES | | Kč |
| příplatek za přihlášku a/či platbu po 30.9.2016 | 100 Kč | ☐ |
| za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!) | 100 Kč | ☐ |

Upřesnění pro případ společné platby:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Za mne platí | | částku viz Zaplatím tedy celkem níže | | |
| Já platím za | | ještě i částku | | Kč |

**Zaplatím tedy celkem ..........................** Kč

(kontrolu či přepočet provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí - jedině však - na uvedenou emailovou adresu)

**Úhradu proveďte na účet ČES:**

Fio banka, číslo účtu **2800186228 / 2010**

Jako **variabilní symbol** uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste na vyhrazené místo pro číslo průkazu člena (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!

V případě odhlášení se se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 30.9.2016 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.

V ____________ dne ______.2016 ..................................................

podpis (pro přihlášky poštou)

# KATOLIKA SEKCIO DE ĈEA

invitas ne nur siajn membrojn, sed ankaŭ ĉiujn favorantojn al

**SEPTEMBRA RENKONTIĜO**

por komune travivi belajn tagojn
en spirite riĉa pilgrimloko
**VRANOV U BRNA**

## 16.-18.9.2016



okazloko: Spirita Centrejo de Sankta Francisko el Paola

Por sabato estas planata esperant-lingva sankta meso kaj prelego de frato Sac. D-ro Max Kašparů

PREZOJ: matenmanĝo 50 CZK, tagmanĝo 90 CZK kaj vesper-manĝo 70 CZK, loĝigo por 1 aŭ 2 noktoj /1 pers: 1lita ĉambro 450 CZK / nokte, 2lita 330 CZK, 3lita 280 CZK, 4lita 250 CZK, 5lita 230 CZK

Informoj kaj aliĝoj:
m.svacek@seznam.cz
tel. +420 732 420 675
Katolická sekce ČES, Tršická 6,
CZ-751 27 Penčice

Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio
invitas vin al sia

# KONFERENCO

## 23.-25.9.2016

en ripozcentro Prudká
apud Tišnov,
30km norde de Brno

Programo labora,
faka, ekskursa, ripoza.

Bonvenas ankaŭ nemembroj!

Info:cefea@centrum.cz,
ČŽES
Bratří Hubálků 161,
560 02 Česká Třebová



*Tišnov, urbodomo*
*fonto:Harold, Wikimedia Commons*

# Nitra

En la tagoj 21–24 aprilo 2016 okazis en Nitra Tutslovakia Esperanto-kongreso. La agado realiĝis en la konstruaĵo de Agrikultura Fakultato – loko, kie la unuan fojon en la historio de Slovakio okazos Universala Kongreso de Esperanto en la tagoj 23–30 julio 2016.

La konstruaĵo estis proklamita kiel la plej grava en la pasinta jarcento en Slovakio. Enkadre de la kongresa agado renkontiĝis ankaŭ helpontoj de UK, kiuj estis dividitaj en laborgrupojn.

Jam pasintjare dum UK en la franca Lilo estis evidente, ke la slovakaj esperantistoj ĝuas subtenon de la urba estraro kaj ankaŭ en la supera politiko. La kongreso estas tre zorge preparata, amaskomunikiloj dediĉas al ĝi sian atenton.

La programo estos riĉigita je novaĵoj. Same kiel pasintjare la inaŭguro estos rekte transmisiata en la tutan mondon. Ĉio troviĝas surloke, eĉ la loĝado. Sole la inaŭguro kaj fermo okazos en la sporthalo. Teatraĵoj estos prezentataj en la nova teatra scenejo, kiu troviĝas en la urbocentro kaj en proksimeco de la kastelo.

*Libuše Dvořáková*

# Esperanto od A do Z en la slovaka

Kiam Petro Baláž, la posedanto de la slovaka eldonejo Espero, petis de mi kopirajton pri la eldono de *Esperantem za tři měsíce* en la slovaka, mi ne konsentis. La kialo estis, ke mi ĝuste tiam eklaboris pri ĝia reprilaboro kaj do mi proponis, ke li atendu la novan version, kiun mi ĝoje permesos eldoni ankaŭ en la slovaka.

Sed li reagis, ke li nepre volas eldoni ĝin antaŭ la 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra; logike – li ja ĝuste antaŭvidis leviĝon de la intereso pri Esperanto en Slovakio lige al la UK.

Nu, mi ne cedis, tamen tio rapidigis min kaj miajn helpantojn – alimaniere mi dubas, ĉu la ĉeĥa versio estus jam aperinta. Kaj ankaŭ mi gajnis, eĉ pli ol mi antaŭe supozis, ĉar la tradukantino Katarína Nosková komencis kunlabori kun ni kaj montriĝis, ke ŝi estas sperta rilate al la komputado kaj la rezulto estas, ke la teknika flanko de la multmedia reta aldonaĵo al la lernolibro estas komplete ŝia merito ankaŭ en la ĉeĥa versio.

Tial okazis, ke baldaŭ post la apero de la ĉeĥa versio de *Esperanto od A do Z* aperis samnoma slovaka eldono en la traduko de Katarína Nosková, kies rapidan tradukon mi vere admiregas. La lernolibro do jam povis esti lanĉita dum la Tutslovakia Esperanto-Kongreso en Nitra la 23an de aprilo 2016.

Sur la foto prezentiĝas ĉiuj kunlaborantoj (de maldekstre): Peter Baláž, eldonisto, Katarína Nosková, tradukistino, Petro Chrdle, aŭtoro, Stanislav Košecký, kontrolleganto de la slovaka traduko kaj Edoardo Nannotti (IT), grafikisto.




*Teksto Petro Chrdle, foto Peter Rybín*

# Renkontiĝo en Velké Losiny

14. 5. 2016 realiĝis tradicia printempa renkontiĝo de esperantistoj aranĝata de la esperantista klubo en Šumperk. Ĉi-foje la renkontiĝo okazis en Velké Losiny kun partopreno de 32 esperantistoj kaj Esperanto-amikoj el dek naŭ lokoj de Ĉeĥa Respubliko.



Niaj paŝoj celis de la stacidomo al la kastelo, kie ni renkontiĝis kun partoprenantoj venintaj per aŭtoj. De tie ni faris promenon tra Velké Losiny. Nia unua halto estis tuj en la kastela parko sub arbo, kiun en 1967 plantis esperantistoj el Šumperk.



Duan fojon ni haltis en la nova Sanareo (Areál zdraví), kie ni rigardis la eksteran areon, prenis kafon kaj daŭrigis en la ban-areon, kie ni rigardis la malnovajn konstruaĵojn de banejoj kaj ankaŭ la pasintjare inaŭguritan Termofontan parkon (Thermal park).

De tie ni daŭrigis tra sukeraĵejo kun pralinoj al paperfarejo, kie la manfarita papero estas produktata ekde la 16-a jarcento.

La promenon tra Velké Losiny ni finis per tagmanĝo en nemalproksima restoracio, kie okazis sekva programo, precipe informoj pri rondetoj kaj pri la Esperanto-movado kaj ankaŭ ni kantis esperantlingvajn kantojn. Jana Křížková alportis novaĵojn pri preparoj de UK Nitra kaj Libuše Dvořáková, vicprezidantino de ĈEA, informojn pri Esperanto-muzeo en Svitavy kaj pri antaŭkongreso, kiu okazos ĝuste en Svitavy.



Liberan amuzon riĉigis dolĉaĵoj, kiujn bakis klubaninoj, kaj pluraj komune kantataj kantoj. Ni dankas ĉiujn pro ilia partopreno kaj ĝoje atendas la venontjaran renkonton.

*Libuše Hýblová*
*foto Kvido Janík*

# Scienca Revuo

La celo de tiu ĉi mesaĝo estas atentigi vin pri la Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE). ISAE estas faka asocio pri sciencoj aliĝinta al UEA kaj fondita en 1906. Ĝi eldonas la revuon "Scienca revuo" (SR) ekde 1949.

ISAE kaj ĝia revuo estas unu el la tre malmultaj asocioj pri sciencoj. **La aliĝo estas tute senpaga!** eĉ se eblas fari donacon laŭplaĉe.

Vizitu la retapaĝo:

**https://aktuale.scienca-revuo.info/**

Kompreneble, ni invitas la landajn asociojn al informo de iliaj membroj pri ISAE.

Se vi ŝatus sendi artikoleton pri landa scienca novaĵo, bonvolu ĝin sendi rekte al mi por apero en nia blogo supre menciita.

Se vi ŝatus skribi pli ampleksan artikolon, bonvolu vin registri en la retapaĝo de SR:

**https://scienca-revuo.info/**

Via artikolo tiam aperos en SR, papere.

Se pro iu ajn kialo, vi ne povas ricevi la paĝon de nia asocio en via lando, ni povas sendi al vi la pdf-version de nia revuo por disdono al viaj membroj.
Eblas ke estontece vi ricevos informojn pri SR. Se vi ŝatus ilin ne ricevi, bonvolu sendi al mi etan mesaĝon por ke mi forviŝu vian retadreson el la listo de ricevantoj.
Sincere

*Anthony LUCAS*
*Por ISAE*

# Esperanto-kurso Duolingo

por anglalingvanoj havas jam 422 000 kursanojn kaj preparita estas kurso por hispanlingvanoj (www.duolingo.com)

# Vinilkosmo

Estimataj muzikŝatantoj,
kvankam nia informletero iĝis malofta laŭ la fluo de la jaroj, ni daŭre estas vivantaj kaj plenaj je ideoj kaj projektoj por 2016.

La tradicio ĉi tie en Francio diras ke estas permesite doni la bondezirojn ĝis fino de januaro, kaj... ho ve... nu, ni sufiĉe malfruas, kaj anstataŭ ni diras:

**Feliĉan kaj ĝojan jardekon !!!**

Unuavice venas la tradicia retrospektivo de niaj produktaĵoj, inkluzive de la nova KD "Kajto flugas", de Kajto kompreneble, ĉiam ankaŭ tre vivanta de 1989, kaj eĉ sen unu falto. Pluraj bitaj albumoj freŝdataj ankaŭ disponeblas ĉe Vinilkosmo-mp3.com, kun ligoj por viziti kaj aĉeti ĉi sube.

Sekve, du proponoj, al kiuj ni invitas vin reagi amase, la estonteco de nia produktado dependos de tio! Por resumi, la tradicia fizika sonportilo sur KD fronte al la virtuala nepalpebla bita sonportilo (mp3, ogg, flac aŭ elsendfluo)

Legu ĉi sube por pli da detaloj, kaj antaŭdankon pro via reagemo !!!

Nia kompleta katalogo ĉe:

http://www.vinilkosmo.com

# TOP pri Esperanto

La unua numero 2016 de la gazeto TOP por ĉeĥaj kaj slovakaj tradukistoj kaj interpretistoj alportis la tutan paĝon pri bapto de la libroj **Robinsoni na Sibiři** kaj **Esperanto od A do Z**. Plie ĝi atentigas, ke la titolon **Vortaro de la jaro 2016** akiras **Vikipedio** (kiu havas ankaŭ Esperantan version).

*-mm-*

# Michel Duc Goninaz

(1933-2016)

La 26-an de marto 2016 forpasis akademiano Michel Duc Goninaz, ĉefredaktoro de la nova **Plena Ilustrita Vortaro** kaj tradukinto de kelkaj verkoj, nome **La fremdulo** (Albert Camus), **Sonĝonovelo** (Artur Schnitzler), **Kun Diablo en la korpo** (Raymond Radiguet). Krom tio li aŭtoris **Laŭteman Esperantan-Francan vortareton** kaj ĉirkaŭ 70 artikolojn pri lingvistikaj temoj. Profesie li estis docento pri la rusa lingvo kaj Esperanto.

## Poŝtelefona Esperantokurso

Tre konata estas la kurso *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček. Nun ĝi aperas kiel apo (*mallongigo de aplikaĵo*) por plurfunkciaj poŝtelefonoj (angle: *smarthphones*) Android (Google). Tia telefono estas vera komputilo ebliganta telefoni, foti, interreti, trovi la vojon, fari aŭ rigardi filmetojn, aŭskulti muzikon aŭ - lerni lingvojn. **La apo ankoraŭ estas senpaga.** Por elŝuti kaj instali ĝin: iru per via poŝtelefono al la Google-apobutiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto *Esperanto* aŭ *Esperantokurso.*

Detalojn legu ĉe:

http://www.iei.nl/ieieo77.htm

Novan aplikaĵon ĉe Google-Play vi trovos ĉi tie:

https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperanto

**Certe informu viajn neesperantistajn amikojn.**

*laŭ Stano Marček*

# LEGOLIBRETO XII

en printempo 2016 Esperanta Rondeto de d-ro Hradil en Mladá Boleslav eldonis jam la dekduan volumon de konata **LEGOLIBRETO** kun interesaj artikoloj de Rajko Doleček, Gudrun Pausewang, Max Kašparů, Béla Kovacs, Barbora Vačeřová, Gbeglo Koffi aŭ de Čestmír Vidman pri Božena Němcová. Petu ĉe drahotova@esperanto.cz, 420 720 652 320

*Letos (2016) na jaře vyšla již dvanáctá **LEGOLIBRETO XII** se zajímavými články např. od Rajko Dolečka, Gudrun Pausewang, Max Kašparů, Bély Kováče, Barbory Vačeřové, Gbeglo Koffiho, nebo od Čestmíra Vidmana drama o Boženě Němcové v esperantu. Cena 50 Kč.*

## Usedám nad bílou stránku

Nova libro de Věra Ludíková *Usedám nad bílou stránku* (Mi sidiĝas super blanka paĝo) estas fakte aŭtobiografieto de la poetino, amikino de Esperanto. Ŝi prezentas siajn aktorajn amikojn (Radovan Lukavský, Rudolf Pellar, Milan Friedl, Otakar Brousek), mencias ankaŭ esperantistojn (p. 46-47) kaj tuj poste sian rilaton al Dio post aŭtoakcidento en sia 21-a jaro, viziton de Romo en 2009 por festi 90-jariĝon de kardinalo Tomáš Špidlík, kiu nelonge poste forpasis.

Ŝi ne evitas esprimi siajn opiniojn pri aktualaj politikaj eventoj en Eŭropo.

Parton de la broŝureto ŝi dediĉis al sia familio, al siaj gepatroj, sia edzo, kaj al sia junaĝo, studado kaj maturiĝado.

*Miroslav Malovec*

**Věra Nosková**

# Hejma ĉikano – pri suferigado de viro

El la verko *Chraňme muže* (Ni ŝirmu la virojn); 2010)

ŜI: Kudristino en distrikta urbo, ĉirkaŭ kiu moviĝas korpulentaj damoj, kiuj mem ne scias por si trovi deziratajn vestojn. Ili ŝin vizitas hejme por prove surmeti la stebitajn vestaĵojn. Ŝia provejo estas improvizita kvazaŭsalono, sed ankaŭ loko, kie oni babilas pri modo kaj pri familiaj problemoj, ni diru, ke tie oni priklaĉas ĉion vivan kaj mortan. Por normala virino la rolo estas emociiga – esti ĉioscia, amike rilati kun la edzino de ĉefkuracisto, kun la edzino de viro en la urbodomo kaj de lerneja direktoro, teni sian grasan mentonon sur la pulso de la eturbo. Konsili al la influhavaj damoj, kiel ili vestiĝu, kaj poste renkontadi ilin ŝvelantaj en ŝiaj „modeloj".

LI: Etstatura, modesta, silentema, entuziasme sindona al Esperanto, kiun li certe jam scipovas, sed tamen plu studas kaj ankaŭ iom instruas, iom li tradukas. Krome li estas entuziasma piediranto – ekskursanto kaj hobia ĝardenisto. Tre ŝparema. Aspekte iom malzorgata, sed se oni konscias liajn vivkondiĉojn, oni ne miras.

ŜI: Antaŭ la damoj ŝi pro la edzo hontas, cetere ŝi malestimas lin. Dum jaroj per konstanta ĉikanado ŝi sukcesis la bonulon prempuŝi en la plej etan ĉambron de la loĝejo, de kie li eliras en la komunajn spacojn nur, kiam ŝia atento estas kaptata de televido, aŭ kiam ŝi estas forlasinta la loĝejon. Li estas ekstreme modesta, kaj tamen apud la emerita pensio li ankoraŭ kromlukras, certe li ie embuskas la monon! diras ŝi kaj riproĉas lin, ke li ne informas ŝin pri sia ŝparaĵo, ke ĝi ne estas por ŝi alirebla, ŝi ja scius, kiel la monon investi. Tio estas vere koleriga. Foje ŝi de li iel akiris informon, ke la ŝparaĵon ricevos iliaj du filinoj, sed laŭ la testamento, kiun li decidis, la mono alfalos al ili nur post lia morto. La viro vivtenas sin mem, li proporcie kontribuas la familiajn elspezojn, sed li nutras sin proprakoste, de sia edzino li nenion postulas – evidente ŝi direktus lin al diablo… Ne estus juste lin riproĉi. Kaj iel elpremi lian ŝparaĵon eblus malfacile, sed malgraŭ ĉio ĉi la virinon tiu stato iritas kaj ŝi tion al li ĉiutage evidentigas. Jam kelkfoje ŝi lin vangofrapis, kiam li krucis ŝian vojon, aŭ neglektis iun regulon, kiun ŝi fiksis.

LI: En sian ĉambreton en la kune posedata kooperativa loĝejo li prizorgis etan kuirilon, plastan lavopelvon, kruĉon por trinkakvo kaj sitelon por la akvo uzita, kaj por momentoj de plej peza neceso eĉ noktovazon. En la lavpelvo li foje lavas manĝilaron, alifoje ŝtrumpetojn… Apud hejtilo ĉiam sekiĝas iu tolaĵo. En la banĉambron li kuraĝas eniri nur, kiam la edzino forlasis la loĝejon, kaj eĉ tiam li strese atentas, ĉar ŝi ja povus subite reveni.

ŜI: Ŝi lin sarkasme primokas, antaŭ la damoj lin kalumnias. La damoj ŝian abomenon solidare partoprenas. Ŝi ne invitas lin eĉ al la kristnaska tablo, al sia flanko ŝi akiris ankaŭ la filinojn, la kalumniojn ŝi vastigas tra la urbo.

AMBAŬ: Divorci ili neniam deziris. Ili ja devus plu vivi apud si, ĉar neniu el ili finance kaj psiĥe estis kapabla al la malamata partnero elpagi duonon de la loĝejvaloro kaj sen tiu kompenso neniu intencis cedi, forlasi la militkampon. La urbeto komprenis ilin kiel strangulojn kaj tragikomikajn figuretojn. Ili kune maljuniĝis interligitaj per la damna loĝejo kaj malamo. Li mortis pli frue.

ooo

*En la ĉielon venas nova homa grupo. La Di-sinjoro al ili diras, ke ili apartiĝu al tri grupoj. Viroj, kiuj estadis sub la pantoflo de sia edzino iru maldekstren, la viroj hejme rolintaj kiel generaloj stariĝu dekstre, kaj la virinoj foriru kun Sankta Petro, ĉar la Sinjoro volas kun la viroj interparoli.*

*Unue li alparolis la subpantoflulojn: „Kial okazis, ke vi tiel falis, ke vi submetiĝis al la edzina regado?“ La viroj nur levadis la ŝultrojn, ili mem ne sciis.*

*Poste la Sinjoro sin turnis al unusola viro staranta dekstre kaj instigis lin: „Do, nun vi diru al ni, kiel oni devas virmaniere fiere vivi, ke vi ne estu nura obeema subpantoflulo! Instruu la ceterajn, kiel ili devis esti kondutontaj!“*

*La viro klinis la kapon kaj murmuretis: „Tion mi vere ne scias. Mia edzino diris al mi, ke mi stariĝu dekstre, mi do staras ĉi tie.“*

El la ĉeĥa tradukis Věra Muchnová kaj Jan Werner

**KOREKTO**. En STARTO n-ro 1/2016, en la Raporto pri ĈEA-agado, kompilita de -padv- estas erare menciite, ke la romanon de Věra Nosková *Metamorfozoj* tradukis Věra Muchnová kaj eldonis SILE Brno. Ĝuste devis esti, ke la verkon tradukis Jan Werner kaj Věra Muchnová kaj eldonis Jan Werner en la eldonejo MSD Brno.




Koncertoj, spektakloj, prelegoj, interesaj homoj, favoraj prezoj!
Venu al la **XXXII-a ARKONES**
(ARtaj KONfrontoj
en ESperanto)
23.-25.9.2016 en Poznań
(Pollando)!
http://www.arkones.org/eo

# Karel Havlíček Borovský (1821-1856)

## La 160-a datreveno de forpaso de la aŭtoro de *La bapto de caro Vladimir*

### *II-a parto*

Havlíček ŝatis skribi epigramojn. Li diradis, ke epigramoj estas ujetoj, en kiujn li enverŝas sian koleregon. En Ruslando li versis du trionojn de siaj epigramoj. La epigramoj estis dediĉitaj al eklezio, reĝo, patrujo, muzoj kaj la mondo. Li ankaŭ ĉeĥigis epigramojn de romiaj aŭtoroj (Iuvenalis, Martialis).

En la familio de la profesoro li ne sentis sin bone kaj ankaŭ rusoj baldaŭ lin malŝatis, ĉar li ĉion kritikis kaj havis opiniojn, kuj ne plaĉis al etburĝoj. Havlíček eĉ timis, ke pro siaj opinioj li estos sendita en Siberion. Bonŝance lia problemo estis eksterordinare solvita. Filo de la profesoro havis malriĉan kuzon. Havlíček edukis ambaŭ knabojn sammaniere, nerespektante diferencojn inter riĉulo kaj malriĉulo, kaj tio ne plaĉis precipe al edzino de la profesoro. La riĉa knabo vangofrapis sian kuzon, kiu eĉ ne aŭdacis defendi sin kontraŭ li. La temperamenta demokrato Havlíček vangofrapis orgojlan riĉulidon – kaj devis foriri. Li revenis en Aŭstrion, kie li eksciis, ke lia patro mortis.

En la jaro 1845 Havlíček fariĝis redaktoro de la ĵurnalo Pražské noviny (Ĵurnalo de Prago) kaj ĝia aldono Česká včela (Ĉeĥa Abelo).

En la jaro 1845 Havlíček eldonis artikolaron „Obrazy z Rus“ (Bildoj el Ruslando“), kie li priskribis siajn impresojn, en la ĵurnalo Česká včela (Ĉeĥa Abelo) kaj en la jaro 1846 en la ĵurnalo Časopis Národního muzea (Ĵurnalo de Nacia Muzeo). Multe da ĉeĥaj slavamantoj estis ŝokitaj, ĉar Havlíček atakis la ideon de tutslavismo, la rusan caron kaj la ortodoksan eklezion, kiu al la caro fervore servis.

Havlíček, kiu la 4-an de marto 1848 edziĝis kun Julie Sýkorová, filino de ĉasgardisto, travivis la plej belan periodon de sia vivo. Anstataŭ senpolitika ĵurnalo Havlíček ekredaktis la ĵurnalon Národní noviny (Nacia ĵurnalo), kie li povis propagandi ĉeĥan liberale-demokratan programon. Pro aŭdacaj politikaj artikoloj li estis malliberigita. Bonŝance li estis deputisto kaj danke al sia deputista imuneco li estis baldaŭ liberigita.

Havlíček ne ŝatis revoluciojn kaj tial ne partoprenis en komenco de ĉeĥa revolucio en la jaro 1848. Malŝatata aŭstra ŝtata kanceliero Klemens Lothar Metternich (1773-1859) devis abdiki, sed la revolucio ne estis sukcesa. Ĉeĥoj, kiuj revis pri libereco (enkadre de aŭstra monarĥio), ne volis kunlabori kun aliaj nacioj, kiuj ankaŭ volis atingi liberecon. Vane la juda kuracisto kaj poeto Siegfried Kapper (1820-1879) versis ĉeĥlingve, ke ankaŭ judoj revas pri libereco kaj volas batali flanke de ĉeĥoj: „Mi estas filo de judoj! ... vi ne scias tristajn afliktojn, ami la patrujon estante en ĝi fremdulo!“ (Syn já Židů jsem!... ty neznáš boly rmutné, milovat vlast a být v ní cizincem!“) − Eĉ tiel granda demokrato kiel Havlíček kapablis skribi malafable kontraŭjude: „Tial, kiu volas fariĝi ĉeĥo, tiu devas ĉesi esti judo.“ („Pročež musí, kdo chce být Čechem, přestat být Židem.“)

Ĉeĥa nacionalismo estis tiel granda, ke ĉeĥoj en la jaro 1848 kunlaboris nek kun germanoj nek kun hungaroj. Ili ne kunlaboris eĉ kun sia plej proksima naj-

bara slava nacio – moravianoj. Tial malbone preparita kaj ĥaosa revolucio, dum kiu en stratoj de Prago falis multe da homoj, precipe studentoj, estis sen helpo el Moravio facile venkita de spertaj soldatoj de aŭstra generalo Windischgrätz.

La 24-an de decembro 1848 al geedzoj Havlíček naskiĝis ilia unusola filino Zdena Havlíčková (1848-1872).

Post venko super la revolucio plifortiĝis absolutismo de la juna aŭstra imperiestro Francisko Jozefo la 1-a (1830-1916). Ministro de internaj aferoj fariĝis Alexander Bach (1813-1893). Oni ofte parolas pri „absolutismo de Bach“, sed fakte tio estis absolutismo de la juna imperiestro, kies rekta subalternulo estis ĉefo de polico kaj fondinto de ĝendarmaro Johann Franz barono Kempen von Fichtenstamm (1793-1863).

La reĝimo permesis nacian folkloron, sed malpermesis politikajn agadojn. Homoj povis labori, amuziĝi, sed ne devis enmiksiĝi en politikon. Sed Havlíček ne povis silenti. Li denove ne obeis (kiel antaŭe en lernejo), laŭte kritikis absolutismon, sed ankaŭ tutslavismon kaj etburĝan kvazaŭpatriotismon. Kaŭze de sia privata „milito kontraŭ stulteco kaj kolero“ (esprimo el lia epigramo pri si mem) Havlíček havis multe da malamikoj. Sed la ĉeĥa popolo lin amis, ĉar kuraĝa redaktoro kapablis skribi eĉ tion, pri kio aliaj ne aŭdacis publike paroli.

En aprilo 1849 Havlíček estis akuzita kaj devis defendi sin antaŭ juĝo. Li sukcesis, sed la 28-an de aŭgusto 1949 li estis denove malliberigita − por du semajnoj. Lian ĵurnalon Národní noviny aŭstroj malpermesis.

Ekde la 8-a de majo 1850 li eldonis la ĵurnalon Slovan (Slavo), en kiu li kritikis ne nur absolutismon, sed ankaŭ romeklezion, ĉar romkatolika eklezi-estraro post la revolucio fervore apogis la imperiestron. La reĝimo konfiskis eldonojn de la ĵurnalo kaj eĉ provis korupti ĝian redaktoron. Oni ofertis al Havlíček 4 000 florinojn kaj bonan monatan salajron, se li skribos por la reĝimo. Sed Havlíček ne estis koruptebla. Li mem ĉesis eldonadon de Slovan, kies lasta numero estis eldonita la 14-an de aŭgusto 1851. Li volis iomete ripozi kaj precipe protekti sian familion, kiu el Kutná Hora translokiĝis en Německý Brod. Lia edzino Julie estis tre malsana (tuberkulozo). Sed liaj malamikoj akuzis lin kaj lian tipografon pro du artikoloj: „Kial mi estas civitano“ („Proč jsem občanem“) kaj „Administrado de komunumaj aferoj“ („Správa záležitostí obecných“). Havlíček bravure defendis sin kaj sian tipografon kontraŭ juĝo en Kutná Hora, sed tio estis lia lasta venko en batalo kontraŭ absolutisma reĝimo.

La 13-an de decembro 1851 ordonis la 21-jara imperiestro Francisko Jozefo la 1-a Havlíček-on malaperigi el Bohemio. La deportadon aranĝis Kempen. La 16-an de decembro aŭstra polica komisaro Franz Dedera kun regiona estro kaj ĝendarmoj nokte alvenis en domon de Havlíček. Ili vekigis la redaktoron kaj montris al li dokumenton de Bach. Havlíček devis esti deportita en nekonatan lokon de la monarĥio. Havlíček nur sukcesis rapide adiaŭi sian edzinon Julie, filinon Zdena kaj fraton Filip.

La loko estis episkopa tirola urbeto Briksen (Brixen), kie tiam loĝis 2 700 loĝantoj. Havlíček de tie ne povis fuĝi, ĉar inter Alpoj estis nur unu ŝoseo.

(*daŭrigota*)

*Oldřich Arnošt Fischer*

# Jubileoj

**Viktor Dvořák** festis en marto sian 80-jariĝon. Li studis nuklean fizikon ĉe teknika universitato en Prago, laboris ĉe esplorinstituto en Přemyšlení-Zdiby. Es-




peranton li lernis antaŭ 1950, sed al la movado li revenis kiel emerito. Li prizorgis esperantigon de la oficiala retejo de Moravské Budějovice (tr. Zdeněk Hršel), en 2008 donacis al la Nacia Biblioteko fondoŝtonon kun surskribo *Esperantisté ČR*, aranĝis plurajn ekspoziciojn pri Komenio kaj Otokar Březina, eldonigis du librojn pri Březina en Esperanto (tr. T. Pumpr kaj J. Kořínek) kaj prelegis kun M. Malovec en seminario pri la poeto. En 2011 li ricevis honoran membrecon de ĈEA.

**Vlastimil Kočvara** festis la saman jubileon en aprilo. Post studado en minista altlernejo en Ostrava li laboris kiel faka instruisto en mezlernejoj de Opava. Li estas ankaŭ multjara prezidanto de Matice slezská. Esperanton li lernis en



1948, aktivis en junularo, fondis rondeton en Opava kaj organizis kulturajn festivalojn omaĝe al Petr Bezruč. En 1969 li fariĝis estrarano de ĈEA prizorganta eldonadon de literaturo. Danke al li aperis serio *Panoramo* kiel literatura aldono de Starto, verkoj kiel *Sileziaj kantoj* (Bezruč), *Tridek jaroj* (dokumento), *Ĉiam malnova kaj ĉiam nova - Pragaj impresoj* (Bradatsch) kaj *Majo* (Mácha). Inter 1993-1999 li estis prezidanto de ĈEA kaj en tiu funkcio li invitis UK-on al Prago en 1996. Honoran membrecon de ĈEA li ricevis en 1999. Li helpas ordigi Esperanto-kolekton en la Urba Muzeo de Česká Třebová.

**Zdeněk Pluhař** atingis sian 80-jariĝon



en majo. Laŭprofesie kemiisto. Li estis multajn jarojn profesia laborulo en sekretariejo de ĈEA, laboris en scienc-teknika sekcio, helpis ĉe preparo de novaj vortaroj de Kraft, li mem prilaboris ĥemian vortaron e-ĉ kaj ĉ-e kaj vortaron eko-turisman. Ofte li prelegis dum AEST-oj. Honora membro de ĈEA (1999).

**Miloslav Šváček**, en februaro 75-jara, estas konata kiel prezidanto de ĉeĥaj katolikaj esperantistoj kaj redaktoro de la gazeto **Dio Benu**. Inter



2003-2012 li prezidis eĉ la tutmondan IKUE. Plie li organizis tri IKUE-kongresojn en Ĉeĥio (Olomouc 1995, Kroměříž 2002, Velehrad 2006) kaj katolikajn tendarojn en Sebranice apud Litomyšl. Similajn tendarojn li organizis jam dum socialismo en Herbortice kaj estis persekutata de la komunista reĝimo. En 2005 li fariĝis honora membro de ĈEA, en 2008 la urbo Přerov atribuis al li medalon de Komenio kaj en 2009 li ricevis memormedalon de Ĉeĥa Episkopara Konferenco.

**Petr Chrdle**, en marto 70-jara, studinto de elektroteknikо, estas en Esperantujo konata kiel posedanto de firmao KAVA-PECH, kiu organizas konferencojn, karavanojn al UK-oj kaj eldonas esperantlingvan (kaj alilingvan) literaturon. Inter 1987-1993 prezidanto de ĈEA, ĝis 2011 estrarano kaj nun ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio. En 2008 honora membro de ĈEA. Docento de AIS San Marino. Li ankaŭ revivigis la seminariojn KAEST. Inter liaj eldonaĵoj ni trovas beletron (Čapek, Hašek, Havel, Kafka, Schnitzler), lernilojn (Esperanto od A do Z, Esperanto pro děti, Esperanto přímou metodou, Esperanta-ĉeha vortaro, Ĉeĥa-esperanta-vortaro), fakajn verkojn (Nova realismo, La afrika medicino, Kompendio de psikanalizo) kaj ankaŭ enĉeĥigitajn librojn el Esperanto (Skandál kolem Josefa, Arne, syn náčelníka, Maškaráda kolem smrti, Robinsoni na Sibiři). Ne mankas ankaŭ ĉeĥlingvaj aŭtoroj. Laŭ Nacia Biblioteko li eldonis 171 titolojn.



**Pavla Dvořáková**, fraŭline Jodasová, asocia komitatanino, atingis en majo sian rondan jubileon. Ŝi studis informsciencon kaj naturajn kaj muzikan terapiojn. En la movado aktivas ekde 1983, 7 jarojn laboras en la asocia komitato. Ŝi redaktas la asocian kaj la muzean retejojn, ŝi preparis migran ekspozicion kaj plurajn ekspoziciojn en nia muzeo en Svitavy kaj prizorgis eldonon de pluraj kompakt-diskoj. Ŝi ofte instruis kaj organizis dekojn da aranĝoj; okupiĝas pri tradukado de turismaj tekstoj kaj filmoj, Vikipedio kaj sonregistrado.



# Aliaj vivjubileoj

Ekde fino de marto ĝis fino de junio festis sian vivjubileon jenaj membroj. Elkoran gratulon kaj multan sanon!

RNDr. **František Nosek**, Praha
**Václav Láni,** Olomouc,
**Milada Vondroušková**, Brno
**Stanislav Goliáš**, Bzenec
**Petr Brzoska**, Havířov
**Milada Polláková**, Rohovládova Bělá
**Zdenka Rejlová**, Třebíč
**Irena Papírníková**, České Budějovice
**Jiří Hanousek**, Liberec
**Jarmila Šolleová**, Žandov
**Jiří Pospíšil**, Ruda nad Moravicí
**Miroslav Špinar**, Žďár nad Sázavou
**Václav Stibůrek,** Benešov

# Ni kondolencas

La 30-an de majo 2016 forpasis s-ro **Adolf Veselý** el Brno (nask. 1928), entuziasma SAT-ano. Li esperantigis eseon de Milan Šimečka ***Nia angorplena socio*** kaj kun Pavla Drinocká ĉeĥlingve verkis eseon ***Setkání s abbé Pierrem*** (Renkonto kun abato Pierre). En 1948 li fuĝis antaŭ komunismo kaj militservo al Bavario, poste al Francio kaj travivis multajn aventurojn. Al la patrujo li revenis kun franca edzino kaj reliefo de Eŭgeno Lanti, kiun li donacis al nia Esperanto-Muzeo en Svitavy.



# Jak platit svazu

## Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

*(daŭrigo el la paĝo 42)*



Kiel la kvara edzino de Karolo Eliška Pomořanská (Elizabeta de Pomerio) en belega robo de la ĉeĥa reĝino proksimigis al ni en unuhora teatraĵo sian vivon de la reĝino ĉe la flanko de la reĝo Karolo la Kvara. Ĉiuj partoprenantoj estis ravitaj per majstra esprimado, kiujn ili taksis per entuziasma aplaŭdo.

Poste sekvis informoj pri agado de ambaŭ organizaĵoj kaj de ceteraj kluboj el CZ, ja entute partoprenis 45 esperantistoj preskaŭ de 20 lokoj de nia respubliko.



La vetero estis agrabla ankaŭ por promenado sur kastelaj remparoj, kelkaj trarigardis la parton de multaj kastelaj ekspozicioj. La foto montras nur restantajn partoprenantojn, kiuj ne rapidis al trajno aŭ buso. Ĉiuj forveturis kontentaj kaj ĝojatendas pluan renkontiĝon kaj la sepan kongreson de AEH en aprilo 2017.



*Jarmila Rýznarová*
*Fotoj L. Chaloupková kaj J. Hron*

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**47. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla**: 15.8.2016

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**
**47-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.8.2016

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO 2016

**2016-07-19/23** Antaŭkongreso en Svitavy
Info: cea@esperanto.cz

**2016-08-12/15** Renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov Info: let.lancov@seznam.cz

**2016-09-16/18** Renkontiĝo de la Katolika sekcio de ĈEA en Vranov u Brna
Info: m.svacek@seznam.cz

**2016-09-(17)** PoFeRo de EK Písek
Info: pisek@esperanto.cz

**2016-09-23/29** Konferenco de Ĉeĥa Fervojista E-Asocio en Prudká ĉe Tišnov
Info:cefea@centrum.cz

**2016-10-03/09** Skokovy
Info:aeh@esperanto-aeh.eu

**2016-10-13/16** La 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov Info: ces@esperanto.cz

**2016-12-04** Marcipana Kristnasko
Info: svitavy@esperanto.cz

**2016-12-10** Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek Info: pisek@esperanto.cz

## Amika invito

al tradicia semajna seminario en Ĉeĥa Paradizo, al familia pensiono **ESPERO** en la vilaĝeto **SKOKOVY** – 75 km nord-oriente de Prago – en puran naturon

**de la 3-a oktobro ĝis 9-a oktobro 2016**

inter homoj sanaj, handikapitaj, junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui naturon. Oni povas ekzerci la korpon kaj spiriton, krei mane memoraĵojn kaj ion alian plu…babili, frandi, promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ lerni….

Senbara modesta medio, 2-5 litaj ĉambroj, prezo proksimume 420 Kč/tago (l Eŭro 27 Kč) por kompleta servo je unu tago. Necesejoj kaj duŝejoj en koridoro. Interreta konekto. Oni pagas surloke. Pago por asocio 100 Kč.

Kontaktoj: Jindriška Drahotová
Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01
Tel: 420 720 652 320
drahotovaesperanto@seznam.cz
drahotova@esperanto.cz
www.sweb.cz/espero.skokovy
www.mlboleslav.cz/esperanto




Renkontiĝo en Velké Losiny
(*foto L. Dvořáková*)



Nostalgia veturo Svitavy-Polička
(*foto L. Dvořáková*)




Renkontiĝo de E-mentalo en Prago
(*foto J. Markovič*)



Muzea nokto en Svitavy
(*foto J. Čejková*)

(*foto P. Rybín*)

